

# ESPERANTO-MIDI-PYRENEES (FEDERACIO)

## JARRAPORTO DE LA JARO 2015-2016

### 1. Regiona kunordigado

---

*Membraro (kluboj, individuoj) kaj evoluo...*

*Federaciaj kunsidoj, kongresoj...*

*Rilato kun UFE, partopreno en landaj instancoj (ekz. interfederacia konferenco)...*

**La membraro** malkreskis de 121 ĝis 109 (15 el CEEA, 68 el EKC, 18 de Esperanto-Tarn kaj 8 ? individuaj membroj de ufe, deko da membroj estas en pluraj listoj aŭ ne loĝantoj de la regiono).

La asocio ne estis reprezentata dum la **3 ufe-komitatkunvenoj de 2015**.

Estis **3 kunsidoj en Arrout** antaŭ aŭ post la staĝoj por ĉefe interŝanĝi informojn.

**Nia jarkunsido** okazis la 13/12/2016 en Toulouse, okaze de la Esperanto-festo. Partoprenis 10 personoj, el 5 departementoj. Unu nova asocio aliĝis : Eurokka, kaj 2 novaj personoj al la komitato.

En la **komitato** membras Véronique Bichon (09), Alain Casiez (09), Jorgos Comte (09), Gilbert Darrieux (65), Marc Roger (31), Marion Quenut (31), Bernard Legeay (12), Michel Metzger (81), Christophe Chazarein (31) et Francis Bidault (81), membris kaj rezignis Christiane Petit (31)

### 2. Informado kaj komunikado

---

*Federacia gazeto, federacia retejo...*

*Informa materialo...*

*Informado en diversaj medioj (foiroj, lernejoj, ktp.)...*

*Partopreno en landskalaj kampanjoj...*

Nia asocio havas **informbultenon** kaj **retejon**.

Aperis nur unu numero (januaro) de la « Cirkulero de Midi-Pyrénées », interna **bulteno**, sendita kutime rete (papere al tiuj sen retadreso). Tiu ĉi estis sendita al ĉiuj membroj, kune kun la Krokodil' de EKC ; en la pasintaj jaroj, nia asocio pagis por la printado, sed ĉi-foje EKC pagis la tuton.

Niaj retaj paĝoj kuŝas nun en la **portalo** de Esperanto en Midi-Pyrénées. Estas paĝoj pri la federacio, paĝoj laŭ departamento, paĝoj laŭ asocio, kaj aparta blogo por la Cirkulero. En la cirkulero, publikiĝis 3 artikoloj en 2016. Marion respondecas pri ĝi. La adreso estas <http://Esperanto-midipyrenees.org>. En 2015, ni repagis por 3 jaroj por la « gastigado » de la retejo (duon-duone kun EKC).

Ĉi-jare, EKC akceptas denove **volontulojn** kadre de Service civique, 2 esperantistojn ne francaj, Manuela kaj Robert, ili aparte laboras pri komunikado.

La lokaj asocioj prizorgis **standojn en diversaj manifestacioj** laŭ la jaro en Tuluzo, Lavour, Graulhet, Ariège.

**Radioelsendoj** pri esperanto okazas regule en Tuluzo. Volontuloj de EKC helpas de sia alveno. La elsendoj de Tuluzo povas esti interrete aŭskultataj ĉe <http://canalsud.net>, kaj elŝutitaj en la portalo [esperanto-midipyrenees.org](http://esperanto-midipyrenees.org).

Ne estis aparta ago de nia asocio por **konigi esperanton en la regiono** (en la departementoj sen asocioj, kiel pasintaj jaroj en Montalbano kaj Kadurko). Ĉi-jare, ne estis stando en Bio Synérgie, en Montalbano, pro manko da homfortoj kvankam estas nun esperantistoj surloke.

### 3. Instruado kaj ekzamenoj

---

*Kursoj, staĝoj, nombroj da lernintoj...*

*Ekzamensesioj federaciaj aŭ klubaj, nombro da ekzamenoj...*

**Kursoj** pli malpli regule okazas iniciate de lokaj grupoj (Lavaur, Graulhet, Rodez, Montauban, Toulouse, Verniolle, Mirepoix, Laroque d'Olmes(Jorgos), Foix, Montgaillard (Alain). Tri **semajnfinaj kursoj** okazis en Arrout (Ariège), organizitaj de EKC (inter 15 kaj 23 partoprenintoj).

En Tarn et Garonne, esperantisto kadre de « Les Francas » gvidas plurajn kursojn al infanoj.

En Lavelanet, estis ekspozicio, prezento kaj klubo en mezlernejo, René kaj Nathalie zorgis pri ĝi. Naskiĝis klubo en Collège Victor Hugo(René).

### 4. Kulturo kaj aranĝoj

---

*Prelegoj, prelegturneoj, renkontiĝoj, festoj, ĝemelklubaj aranĝoj...*

*Partopreno en kongresoj aŭ aranĝoj landaj, eŭropaj aŭ mondaj...*

La **tradicia Festo de Esperanto** kunvenigis en Tuluzo, la 12an kaj 13an de decembro 2015, kvindek da esperantistoj el la regiono, 4 katalunojn, kelkajn neesperantistojn, por atelieroj, vizitoj, bankedo, ludo, spektado de filmo, foiro de asocioj, libroservo.

Okazis dutaga **korusa staĝo** en Aigues vives, Ariege en decembro 2015.

Okazis **Turneoj** UFE de Saeed Ahmad en marto kaj Ahman Junusov en Junio, neformalaj **vizitoj** de eksterlandaj vojaĝantoj.

Okazis tria **Nomad'kurso** en januaro en Madagaskaro, kaj individuaj vojaĝoj, partoprenoj al **internaciaj renkontiĝoj**

**Regulaj renkontiĝoj** por praktiki la lingvon, lingvo-kafejo en Tuluzo, kaj en Foix (nove, de Aprilo 2015), manĝo-klaĉoj kaj babilmanĝoj en Tuluzo, en Arieĝo.

Marion